## IMPRESSO

## FRUKTODONA PERIODO

La 28an de Aprilo lasta, okazis la Ĉenerala Ordinara Kunsido de B.E.L. kun ĉeesto de liganoj kaj reprezentantoj de diversaj esperantistaj institucioj.

Post la legado de la "Raporto de la Estraro rilata al 1983", la Kunsido traktis jenajn temojn:

- 1. Estis aprobita la propono de la kasisto, D-ro Aloísio Sartorato, pri kotizoj por la periodo 01/06/84 ĝis 31/12/84: MS Cr\$ 4.000,00; M-1 Cr\$ 12.000,00; M-2 Cr\$ 36.000,00; DM Cr\$ 360.000,00;
- 2. D-ro Walter Francini, Vicprezidanto de la Organiza Komitato de la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto, faris detalan raporton pri la atingoj de la organizantoj de la Kongreso. Estas menciinde la prezento de la bela kongresa afiŝo: kvinpinta verda stelo sur la konturo de Brazilo kaj 20 flugantaj hirundoj, simbolo de la urbo Campinas. La aŭtoro de la kongresa afiŝo estas S-ro Luiz Telles;
- 3. La Kunsido rajtigis la Prezidanton, S-ro Fernando Marinho, trakti kun D-ro Victor Sadler la iniciaton de U.E.A. starigi regionan centron eventuale en Rio de Janeiro;
- 4. D-ro Álvaro Fausto de Souza estis elektita membro de la Konsultiĝa Konsilantaro pro la forpaso de D-ro Brás Cosenza;
- 5. La Prezidanto de B.E.L. informis, ke Prof. Evaldo Pauli reprezentos nian asocion en la 69a. Universala Kongreso de Esperanto;
  - 6. D-ro Lazarus Brieger kaj Prof. Egon Shaden estis elektitaj bonfarintaj membroj de BEL.

## Raporto de la Estraro de B.E.L.

En la supre citita Kunsido, S-ro Fernando Marinho, la Prezidanto de B.E.L., prezentis la "Raporton de la Estraro Rilatan al 1983". Jen la ĉefaj eroj:

Periodaĵoj - aperis 4 numeroj de BRAZILA ESPERANTISTO, 13 de ESPERANTO NOTÍCIAS kaj 10 de BEL INFORMAS.

Radiprogramo - BEL disaŭdigis 43 kvinminutajn radiprogramojn nacilingve. Estraranoj de BEL partoprenis du 30-minutajn intervjuojn pri Esperanto.

Societaj Kunvenoj - Forumo: unu; Ĝeneralaj Ordinaraj Kunsidoj: 2; Aŭdi-vida programo: 1 prelegoj: a) prelego de D-ro Victor Sadler en Fondaĵo Getúlio Vargas; b) prelego de D-ro Mário Ritter Nunes en Campos, RJ; c) prelego de S-ro Walter Francini en Domo de Rui Barbosa, RJ; c) F-ino Mônica Boller faris 3 prelegojn en la urbo Parnaiba (PI). Entute 6 prelegoj. Kunvenoj por lanĉo de verkoj: 2 de D-ro Sylla Chaves kaj 2 de D-ro Diderto Freto.

<u>Kursoj</u> - Regule okazis kursoj en klaso kaj perkorespondado. BEL aljuĝis 86 diplomojn: 59 bazajn, 16 progresigajn kaj ll superajn. Krom la regulaj kursoj okazis du rapidaj elementaj kur soj gviditaj de D-ro Sylla Chaves.

Eldona Agado - Tria eldono de "Vocabulário Português-Esperanto/Esperanto-Português", de Carlos Domingues; de Sylla Chaves: l-a eldono de la afiŝo-disko-kurso "Kio estas Esperanto?"; l-a eldono de la lernilaro "Kantu kaj Iernu" kaj la l-a eldono de longdaŭra disko kun libro "Bestetoj, Bestegoj kaj Bestaĉoj". La verkoj de Sylla Chaves estas kuneldono de BEL kaj FUNDAÇÃO Œ TÚLIO VARGAS.

Membraro:			MS	Ml	M2	DM	В	BM	SUME	
Gis la 31/12/82 Gis la 31/12/83		226 288	143 135	31 23	23 30		2 2	425 478		
	San	ĝoj:	+ 62	- 8	- 8	+ 7		-	+ 53	(12%)
	Varbado por UEA dum 1983:									
	MJ 7	MA 141	MJ(K) •	MA(K) 17 =	Ind.Memb.	SZ 1	P	T 3	SA 11	Kto 28

Perado - Dum la tuta jaro BEL peradis por UEA, Heroldo de Esperanto kaj El Popola Ĉinio.

Kongresoj kaj Renkontiĝoj - BEL estis reprezentita en la jenaj eventoj: 5-a Esperantista Junulara Kongreso (Iporã-GO); Semajno de Internacia Amikeco (Sorocaba-SP); 16-a Brazila Seminario de Esperantistoj (Ouro Preto-MG); 9-a San Paüla Esperanto-Renkontiĝo (Jundiai-SP); 216-a Datreveno de la urbo S.J.Campos; 4-a Jarkunsido de Brazila Konsilantaro de Esperanto (Recife-PE).

Korespondaĵoj - Estis ekspeditaj 468 leteroj, 78 fakturoj, 1.188 enspeznotoj, 98 notoj por mendoj kun pagoŝargo; bultenoj (Esperanto Noticias kaj Bel-informas): 29.500; Brazila Esperantisto: 4.000; flugfolioj, prospektoj kaj aliĝiloj: 4.000. Entute: 40.000 sendaĵoj.

Homaj Fortoj - En 1983, jenaj samideanoj aktivis ĉe nia Ligo: Sekretariaj taskoj: Valéria Santiago kaj Monica Boller (oficistino); Volontula Servo: José Pedro Milagres, Arandi Teixeira Papallardo, Jacy Miranda Sã, Chersoneso Galvão, Lazarus Brieger, Paulo Andrade, José Rabelo de Paula, Calissa Rosa, Elma do Nascimento, Antonio Rodrigues, Arnaldo Lara, Ronaldo Alves de Oliveira, Ricardo França, Mario Ritter Nunes kaj Givanildo Ramos Costa. Kursgvidantoj: a) elementa kurso: Celso Martins, Célio de Freitas Martins, José Bonifácio Leite, Maj Bijleveld, Izabel San tiago, Sylla Chaves; b) progresiga kurso: Celso Martins, José Bonifácio Leite, Maj Bijleveld, Izabel Santiago; c) supera kurso: Jorge Campos de Oliveira kaj Floriano Pessoa; d) profesora kurso: Floriano Pessoa. Periodaĵoj: Aloísio Sartorato (Esperanto Notícias), Jorge Campos de Oliveira (Reviziado), Fernando Marinho (BEL informas) kaj Luiz Alberto Martins (Brazila Esperantisto). Radiprogramo: Joel Manso kaj Dagmar.

\*

## SUKCESPLENAJ VOJAĜOJ TRA BRAZILO

La antaŭa Ĝenerala Direktoro de UEA, d-ro Victor Sadler, vizitis en novembro/83 la nord-ori entajn ŝtatojn de Brazilo. Post partopreno en la 4-a Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperan to (en Recife), li vizitis ankaŭ João Pessoa, Campina Grande, Natal, Fortaleza, Cascavel (Œ), Maceió kaj Salvador.

En Fortaleza, li estis oficiala gasto de la Federacia Universitato de Ceará, kie li prelegis, i.a., pri "Lingvaj problemoj en la Eŭropa Ekonomia Komunumo". Sekve al prelego en la Federacia Universato de Paraiba, tie komenciĝos kurso de Esperanto, 4 horojn semajne, sub gvido de la profesoro pri ĝenerala lingvistiko, S-ro José Elias Borges.

Krom rekontiĝoj en Esperanto-medioj kaj prelegoj por universitatanoj, okazis multloke ankaŭ intervjuoj ĉe radio, TV kaj ĵurnaloj.

En jan-feb/84, d-ro Sadler vizitis la plej sudajn ŝtatojn de la lando. La 14-an kaj la 15-an de februaro, li vizitis la sidejojn de BEL kaj de KKE.

\*